Aldono al ESPERANTO de U.E.A. - januaro 1980.
Respondecas : J. Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

# Esperanto en Belgio

1979 estis por la Esperantomovado en Belgio signifoplena jaro. Multo ŝanĝiĝis. Nome, la unueco, trovita en 1962 ĉe la kreado de Belga Esperanto-Federacio, denove perdiĝis.

Kaŭzo de tio estis nekontesteble la ĝenerala politika situacio en nia lando, kadre de kiu la Ministerio pri Kulturo kaj Edukado jam de antaŭ jaroj disiĝis en du aŭtonomaj ministerioj pri respektive Nederlanda kaj Franca Kulturoj.

Sekve al la fakto, ke tiuj ministerioj nun plu subtenas nur kulturajn aktivecojn okazantaj en la respektivaj lingvaj teritorioj, Belga Esperanto-Federacio devis, por eviti malutilajn konsekvencojn, esti restrukturita laŭ la ekzemplo de la du ministerioj.

Tial do decidiĝis, dum la Kongreso en Karloreĝo en 1978, vole nevole dispartigi la landan federacion en du apartajn asociojn.

Tamen, malfacilaĵoj ne forrestis. Ni devis ja kalkuli je tio, ke la Ministerio pri Nederlanda Kulturo havas,kiel administran jaron, la normalan kalendaran jaron - do, de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro - dum la kontojaro de la Ministerio pri Franca Kulturo situas inter la 1-a de julio kaj la 30-a de junio.

El tio sekvas, ke B.E.F. ne povis esti restrukturita en unu fojo, sed unu el la du novaj asocioj eklaboru ses monantojn antaŭ la alia.

Komencu ni tamen per la komenco.

FLANDRA ESPERANTO-LIGO.

La Flandroj devis, por profiti kiel eble plej baldaŭ de la ministeria subteno, krei asocion antaŭ la 1-a de januaro 1979.

Tio okazis. Dum ĝenerala kunsido je la 7-a de oktobro 1978 en Antverpeno, fondiĝis FLANDRA ESPERANTO-LIGO (VLAAMSE ESPERANTOBOND) kun la jena provizora estraro :

- prezidanto : F. Roose
- vic-prezidanto : R. De Schepper
- sekretario/kasisto : R. Iserentant
- komitatano : G. Debrouwere

Tamen, la unuaj monatoj estis ege dubaj kaj riskaj. Daŭrus ĝis la ĝenerala kunsido de la 24-a de marto 1979 antaŭ ol F.E.L. sukcesis ekfunkcii.

Kiel nova kaj definitiva estraro elektiĝis :

- prezidanto : E. Symoens
- vic-prezidanto : R. De Schepper
- kasisto : J. Verstraeten
- sekretario : J. Bovendeerd
- publikaj rilatoj ; G. Maertens
- gazetara servo : L. De Bruyne.

Tuj la aktiveco ekis. La nova prezidanto senhezite ekagis kaj partoprenigis la aliajn en sia laborplano.

La programo estis ampleksa. Necese estus modernigi la agadon. Krom sia persona agado en ministeriaj kaj aliaj oficialaj medioj, la prezidanto proponis, krom diversajn aliajn aferojn, kunmeti broŝuron rilate ĉion kiu ekzistas pri Esperanto en Flandrio. Le eĉ persone verkis la unuan malneton. Dank'al serioza kunlaboro de la diversaj lokaj grupoj, tiu broŝuro sufiĉe rapide pretiĝis. Sed ... F.E.L. ankoraŭ estis en transira periodo. Se la laborpreteco estis granda, la monrimedoj estis ege necertaj! Mankis - kaj mankas - mono! La eldono de la broŝuro, prespreta devas atendi iom pli da prospero en la liga kaso.

Alia projekto estis pretigi ĝeneralan katalogon de Esperantoverkoj en la diversaj Flandraj bibliotekoj. En tiu ĉi rilato, F.E.L. disponas pri promeso de la ministerio pri aĉeto de kvanto da ekzempleroj kaj ilia disponigo al la ĉefaj bibliotekoj en Flandrio.

Aliaj planoj estas kolekti/krei valorajn dokumentojn propagandcelajn, traduki kaj adapti alilingvajn dokumentojn, traduki gravajn Nederlandajn kaj Flandrajn literaturajn verkojn, serĉi kontakton kun libroeldonejoj kaj aliaj kulturaj organizoj ktp. Sed, ĉiam denove, la agado devas esti adaptita al la financaj rimedoj.

Tamen, eble estos trovebla pli interesa financa subteno de la ministerio. Por tio la agado disvastiĝu kiel eble plej larĝe, horizontale. Pli bone estas krei multajn malgrandajn kernojn en kiel eble plej multe da komunumoj ol centrigi la movadon en grandaj urboj. Krome ekzistas ebleco laborigi diversajn personojn kadre de la "Plano Spitaels" (Bijzonder tijdelijk kader).

La financa situacio devigis la F.E.L.-estraron direkti sian agadon unue al ĉi lastaj eblecoj: t.e. pli streĉa kunlaboro kun la grupoj kaj klopodi krei kiel eble plej multe da kernoj. Dank'al speciale helpo el Antverpeno, Bruĝo, Kalmthout kaj Limburgo, F.E.L. sukcesis pli ol duobligi la kvanton de lokaj grupoj: de 11 grupoj komence de la jaro, ekzistas nun 23 lokaj kernoj, nome en 1) Antverpeno (LA VERDA STELO), 2) Aalst, 3) Beringen, 4) Blankenberge, 5) Bruĝo-Paco kaj Justeco, 6) Bruĝa Junularo, 7) Bruĝa Reĝa Societo, 8) Bruselo - Eŭropa Esperanto Centro, 9) Deurne, 10) Dilsen/Stokkem, 11) Edegem, 12) Gento : La Genta Klubo kaj 13) La Progreso, 14) Hasselt, 15) Kalmthout - La Erikejo kaj 16) Kalmthouta Junularo, 17) Kortrijk - La Konkordo, 18) Leuven - Lovena Esperanto Asocio kaj 19) Esperanto 2000, 20) Mechelen, 21) Mortsel, 22) Turnhout 23) Wilrijk.

Ni certe ankaŭ ne forgesu la tre bone funkciantajn Grafikan Centron en Antverpeno kaj Eŭropan Esperanto-Centron en Bruselo, dank'al kies bonega laboro, Esperanto pli kaj pli enpenetras en la kulturan vivon de la Eŭropa Komunumaro.

Jen en ĝeneralaj trajtoj la situacio en Flandrio ĝis nun.

ASOCIO POR ESPERANTO.

Niaj Franclingvaj samideanoj disponis pri iom pli da tempo. Ili devis pretiĝi por 1-a de julio 1979. Komence de 1979 fondiĝis "ASOCIO POR ESPERANTO- Association pour l'Esperanto" kun, kiel provizora estraro S-ro E. Gillet - prezidanto, S-ro Ch. Norga - vicprezidanto kaj S-ro R. Destabelle - sekretario/kasisto.
Dum ĝenerala asembleo de la 22-a de septembro 1979 elektiĝis jena definitiva estraro : F-ino L. Dreze - prezidantino, S-ro R. Destabelle - sekretario kaj S-ro R. Nizet - kasisto.

A.P.E. spertis ankoraŭ pli da malfacilaĵoj ol F.E.L. Ja fakto estis, ke dum la B.E.F.-periodo la franclingvanoj kontentis pri tio, ke la administra laboro fariĝis de flandraj kunlaborantoj, tiel ke mankas al ili nun la necesajn sperŭlojn, pri kiuj disponas F.E.L.

Normale do, ke ambaŭ asocioj sin reciproke helpu kaj kunlaboru por ke ankaŭ A.P.E., kiel eble plej baldaŭ, povu elfunkcii.

Tamen, malgraŭ ĉio, fondiĝis novaj grupoj en Huy kaj Namur.

-------------------

Bijlage bij
Aldono al ESPERANTO febr. 1980

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

# Esperanto en Belgio

Tiu ĉi rubriko povas esti daŭrigota proporcie al la kunlaboro de la regionaj kaj/aŭ lokaj Esperanto-societoj. Ĝia celo estas raporti pri kio okazas/is/os en nia lando en la Esperantokampo.

Do, ĉiu kiu havas novaĵo(j)n, kiu(j) meritas pli ol nura mencio en ESPERANTO PANORAMA aŭ ESPERANTO EN MARCHE, bonvolu sendi sia(j)n teksto(j)n al la supremenciita respondeculo.

TRADUKKONKURSO por Nederlandlingvanoj.

Ankaŭ en la sezono 1979-1980 okazos konkurso por tradukemuloj, aranĝita de Nederlanda Esperanto-Asocio kaj Belga Esperanto-Federacio.
La regularo estas jena.

Oni povas elekti la nederlandan tekston tradukotan en Esperanton. Se ĝi estas prozo, ĝi ne superu la maksimuman longon de 160 linioj po 60 spacoj. Poemo(j)n oni elektu tiel, ke la ensendaĵo konsistu el 1, 2 aŭ 3 poemoj kun maksimuma kuna longo de 108 linioj. La tradukoj devas esti tajpitaj kaj ne antaŭe aperintaj. Pri la prozo, oni prefere elektu tekston sufiĉe interesan ankaŭ por legontoj, pro enpresigo en eventuale eldonota kolekto de konkursaĵoj. Pri la poezio oni uzu rimon kaj/aŭ metrikon, se tiu(j)n havas la originalo, "libera" poemo restu "libera".
Oni signu ĉiun konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu en fermita koverto slipon kun la vera nomo kaj adreso. Konkursanto rajtas uzi nur unu pseŭdonimon sub kiu li povas partopreni en ambaŭ branĉoj. Rajtas partopreni ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la du antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo en kiu li konkursas. La konkursantoj devas sendi 4 kopiojn de ĉiu ensendaĵo (ankaŭ de la originala teksto) kaj aldoni 3 Internaciaj Respondkuponoj.
La ensendaĵoj atingu antaŭ la 1-a de marto 1980 S-ron Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT.

La estraro de FLANDRA ESPERANTO LIGO nepre alvokas ĉiujn flandrajn esperantistajn skribemulojn kaj poetojn partopreni multnombre tiun konkurson. Lastjare ni tute ne estis reprezentitaj; ni faru pli bone ĉi-jare !

FLANDRA ESPERANTO-LIGO intencas krei reton de reprezentantoj en komunumoj kie ne aŭ ankoraŭ ne ekzistas Esperanto-kerno.

Esperanto Panorama de marto/aprilo 1980 enhavos tiucelatan respondkarton resendotan, plenigita al la sidejo,de ĉiu kiu pretas reprezenti la Esperanto-movadon en sia komunumo.

Pliajn detalojn ricevos la respondintoj.

STAVE.

En la komunuma iernejo de Stave, situanta en Kastelo Lierneux, okazas Esperanto-kursoj fare de S-ro André PIERARD al infanoj malpli aĝaj ol 12-jaraj.

(el LE MESSAGER.)

TRILANDAJ RENKONTIĜOJ.

La organizantoj de la TRILANDAJ RENKONTIĜOJ Belgaj-Germanaj-Nederlandaj anoncas, ke la venonta renkontiĝo okazos en la semajnfino de 03/04 05 1980 en la kastelo RIJCKHOLT, apud MAASTRICHT, Nederlando.

En la programo estos amuza vespero (sabate), interesaj prelegoj kaj aŭtobusa ekskurso tra naturbelega suda Limburgo (dimanĉe).

La kotizo "ĉio enkluzive" estas 50,- ndl. guldenoj ĝirota al kontnumero 4089329 de ESPERANTO CENTRO MAASTRICHT, Frankenstrato 149, NL-6224 GM MAASTRICHT.

Informoj ĉe la sama adreso, telefono : 00 31 43-62 83 39

---------------

Bonvolu atenti pri tio, ke la ĝeneralaj jarkunsidoj de F.E.L. kaj B.E.F. okazos respektive je sabato 15 03 1980, en Antverpeno, Billard Palace, teretaĝa festsalono kaj 22 03 19780 en Bruselo, en ejo ankoraŭ ne certe konata, sed ĝustatempe sciigota al la grupaj respondeculoj.

Tiuj ĝeneralaj jarkunsidoj estas ege gravaj, kaj tial la estaroj de B.E.F. kaj F.E.L. insiste petas multnombre partopreni.

Kiel kutime, tiu kunsidoj estas alireblaj al ĉiuj.

Konsideru tiun ĉi alvokon kiel invitilon kaj

.... estu bonvena !

-------------------------

Bijlage bij ESPERANTO maart 1980
Aldono al ESPERANTO marto 1980

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

# Esperanto en Belgio

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO - 16 - 22.02.1980

ESPERANTO 2000 el Loveno, je sabato 16-a de februaro, bruligis la torĉon de la Internacia Amikeco per impona ekspozicio, soleme malfermita de la urbestro kaj la skabeno pri kulturo de la urbo Loveno.

La oficialan malfermon ĉeestis ankaŭ delegitaro de la estraro de Flandra Esperanto-Ligo kaj de Belga Esperanto-Federacio.

Dum la ekspozicio prezentiĝis interesa diaserio pri la Internacia Lingvo, disponigita de Esperanto-Centro Antverpeno.

Je dimanĉo 17-a de februaro okazis serio de prelegoj en kunlaboro kun "Amnesty International" kaj "Europakring U.K.-Leuven".

Je mardo 19-a de februaro okazis ĝenerala amuza vespero, kiun partoprenis diversaj alilingvaj samideanoj kaj simpatiantoj.

La aliajn tagojn de la semajno okazis ekspozicio, muziko, diaprezentadoj, konkurso ktp.

La Lovena Semajno de Internacia Amikeco finiĝis je vendredo 22-a de februaro por transiri al

ANTVERPENO

kie "LA VERDA STELO" organizis Internacian Popolkantvesperon en kiu ĉefrolis la Svisa trubaduro Olivier TZAUT.

Dum tiu sama vespero, lanĉiĝis la unua levilslogano de la "Movado sen Nomo" "PLIBONIGU LA MONDON, KOMENCU ĈE VI MEM ! "

Laŭ tre simpla, sed kortuŝa maniero, Pastro Ph. Bosmans, iniciatinto de la Bond zonder Naam = Movado sen Nomo, vortigis la celon kaj signifon de la agado de Bond zonder Naam kaj de la unua slogano. Jen, mallonge lian argumentadon :

" La homo estas la nura estaĵo kiu posedas la "vorton", per kiu li povas esprimi kaj diskonigi siajn eĉ plej intimajn sentojn, per kiu li povas montri la staton de sia koro. Per tiu sama vorto, la homo povas plibonigi aŭ malbonigi sian ĉirkaŭaĵon. Se la koro estas malpura, li ankaŭ per siaj vortoj malpurigas sian ĉirkaŭaĵon, se ĝi estas pura, li purigos, do plibonigos la mondon ĉirkaŭ li. Pli ol 90 % de la mizero en la mondo estas kaŭzata de la homoj mem inter si, unu al la alia ! Necesa estu do ke ni plibonigu la staton de nia propra koro, ke ni "komencu ĉe ni mem".
Kompreneble, en la praktiko de la "vorto" multege gravas la lingvo kaj tie Esperanto povos multon realigi."

Kortuŝite la ĉeestantoj varme aplaŭdis Pastron Bosmans kaj liaj kunhelpantoj, kiuj estis je tiu sama okazo publike honorigitaj.

La vespero finiĝis en la konata amika etoso kaj estis bonega preparo al la

10-a festado de la Semajno de Internacia Amikeco en KALMTHOUT.

La festado komenciĝis je 9.30 h. per konkurso por la elekto de Beneluks-Geambasadoroj de la Internacia Amikeco.

ESPERANTO DEURNE

Frans Luyten, prezidanto de ESPERANTO DEURNE, eldonas korespondan kurson por filatelistoj pere de la bulteno de lia filatelista societo.

EŬROPA ESPERANTO-CENTRO.

Dum la paska semajnfino okazos en Bruselo Eŭropa Esperanto Konferenco en la salono TREFPUNT, Forststrato 35 A, 1060 Bruselo. La salono troviĝas ja proksimume 10 minuta distanco de la Suda Stacidomo.

Informoj estas haveblaj ĉe E.E.C., Montoyerstrato 37 b/24 1040 BRUSELO, Tel. 02/513 59 95.

--------

HELPOPETO.

El MEADVILLE (U.S.), ni ricevis jenan leteron :

" Estimata

En mia kolekto de la nacilingvaj tradukoj de LA ESPERO ankoraŭ mankas tiu de la lingvo flandra. Mi esperas, ke iu en via lando bonvolos sendi tion al mi ...

Tre volonte mi sendos al iu(j), kiu(j) deziros unu aŭ pli traduko(j)n el mia kolekto .

Samideanan saluton kaj sinceran antaŭdankon.

CONRAD FISHER

Route 6 Shaw's

MEADVILLE
Pa 16335
U s o n o "

Kiu povas/volas helpi ?

---------------------

Bijlage bij
Aldono al ESPERANTO apr. 1980

Verantwoordelijke
Respondecas J. Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

# Esperanto en Belgio

Marto estis monato de ĝeneralaj kunsidoj.

01 03 80 : ĝenerala laborkunveno de ASOCIO POR ESPERANTO

15 03 80 : ĝenerala jarĉefkunveno de FLANDRA ESPERANTO-LIGO

22 03 80 : ĝenerala jarĉefkunveno de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

Krome okazis dum la Paska semajnfino, 05 kaj 06 04 80, Eŭropa Esperanto-Konferenco en Bruselo.

ASOCIO POR ESPERANTO - 01 03 80

Ĉefaj notindaĵoj estas :
- eksiĝo de la sekretario, S-ro R. DESTABELLE, pro manko de tempo
- kreado de informbulteno "INTERCLUBS" fare de S-ro DESTABELLE
- daŭra kaj bonege funkcianta gazetara servo, prizorgata de S-ro G. PIRLOT kun la helpo de Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo
- grupa agado : organizado de 7 kursorondoj, 4 ekspozicioj, 1 publika prelego, sendo eksterlanden de kasedo okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, malfermo de Esperanto-fako en 3 publikaj bibliotekoj
- kreado de novaj grupoj en HUY kaj NAMUR.

La financa situacio estas ne tro brila, sed ne malespera.

Esperanto en Marche, ekde nun, estos presita en Grafika Centro en Antverpeno.

Propagand- kaj alicelaj afiŝoj estos presitaj kaj disponigataj.

Ĉiuj grupoj, escepte de la du plej novaj anoncadis en la telefongvidilo.

Por helpi, ĉefe al novaj grup-kasistoj, la kotiztabelo estos plisimpligita.

Sur junulara nivelo prepariĝas kreado de francllingva junular-asocio kun la helpo de la jam funkcianta Flandra sekcio de BEJA (FLEJA).

Rilate al la eksiĝo de S-ro DESTABELLE kiel sekretario, menciindas ke li ne retiriĝis el la movado kaj ke li daŭrigos la redaktadon de INTERCLUBS.

Intertempe eksiĝis ankaŭ la kasisto de A.P.E., S-ro Hizet, tiel ke nun A.P.E. estas preskaŭ senkapigita. Restas nur la prezidantino, F-ino GREZE por ĉion aranĝi.

Do, helpo al A.P.E. ege urĝas !

----------

Oni bezonas rapidajn, konstantajn Esperanto-kursojn, ĉar la scienco evoluas rapide. Nun, ni estas en situacio de provo kiel ekzemple en Paderborn. Scienca kOnferenco en Namuro 1980 akceptis Esperanton kiel laborlingvon.

Konvinki homojn pri la utileco de Esperanto en la sciencoj estas necesa tasko, sed por tio oni bezonas ankaŭ monon. La nuna stato ne estas sufiĉe forta k. matura.

Sekvis diskuto pri praktika fomro kaj oficiala rajto. Ĉu lingvoproblemo ne estas homa diskriminacio laŭ jurista vidpunkto ? Ĉu laŭ jurista vidpunkto en la Eŭropa Kortumo la lingvo ne malutilas al la individuo ?

"La rezisto al la ideo de internacia lingvo", prezentita de Mag. Claude PIRON, donis bildon de psikologia fono en socia vivo. Ĉe personoj, kiuj rifuzas internacian lingvon aŭ kiuj havas neniun kontraŭstaron, aperadas timo al ĥaoso. Afekciaj faktoroj - homoj timas leberecon same kiel rigoron - lingva libereco iĝas kiel malpermesata frukto. Mankas la konscienco, ke lingvo prezentas ion alian ol nur komunikadon. Esperanto estas pli homogena ol multe da aliaj lin[illegible] kaj,kiel komunikrimedo, stimulas.

R.T.B.F. intervjuis S-ron Piron kaj aliajn partoprenantojn.

La duan tagon de la konferenco pritraktiĝis la sistemo de laboro de E.E.C. kun Eŭropaj Parlementanoj kaj la financa bilanco.

Ĉu la informado de Eŭropaj Parlementanoj estas efika? Ĉu E.E.C. daŭrigu sian laboron ?
La respondo estas : jes.
Transdoni tiun laboron al landaj asocioj estus dube : ĉu ili daŭrigus? Ĉu ilia agado ne riskas esti neĝenerala?

E.E.C. havas grandan kaj seriozan taskon.

Eŭropa Parlamenta Grupo por Esperanto bezonas novajn fortojn kaj kunlaboron de Esperantistoj en ĉiuj kampoj.

La konferenco certe estis fruktodona kaj bezona !

B.P.

---

Bijlage bij ESPERANTO mei 1980
Aldono al majo

# Esperanto en Belgio

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

Ĉu ni povas memorigi, ke la novajletero "ESPERANTO EN BELGIO" povas esti daŭrigota nur se envenas sufiĉe da novajoj.

Bonvolu do, kiam vi volas anonci iom pli detale ol nur per mencio en la ĝeneralaj programtabeloj, sendi vian tekston al

ESPERANTO EN BELGIO, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL.

AALST

Pro tio, ke ekestis kelkaj malfacilaĵoj en la Aalsta regiono, F.E.L.-kernestraro vizitis la Esperanto-grupon el Aalst je marde 29-a de aprilo.

Post la pridiskutado - kiu okazis ĵus antaŭ la normala klubkunveno - F.E.L.-prezidanto, Edward SYMOENS, faris ege interesan kaj de ĉiuj aprecatan prelegon pri ESPERANTO KAJ AMIKECO.

Jen prelego kiu meritas esti prezentita en pluraj lokoj, antaŭ kiel eble plej larĝa publiko.

ANTWERPEN

La Antverpena Esperanto-grupo "LA VERDA STELO" fermis sian kulturan vintran ciklon per prelego de S-ino Marjorie BOULTON, fama poetino, membrino de la Akademio de Esperanto.

Tre trafe, eĉ foje kortuŝe, S-ino Boulton, laŭ ege agrabla maniero donis, per ne tro longa parolado (io, kion multaj prelegantoj facile forgesas !) sukcesis doni tre bonan kaj por ciu digesteblan superrigardon de la originala Esperanto-poezio.

Tre sukcesa vespero, tamen bedaŭrinde ne sufiĉe vizitata de la Antverpena Esperantistaro.

GENTO

Tute hazarde ni eksciis pri la organizo, fare de la Genta Esperanto-grupo LA PROGRESO, de kunveno de Esperanto-lernantoj (-intoj) kaj de iliaj kursgvidantoj (-intoj) je sabato 17-a de arpilo.

Temis pri "agrabla tago en Florurbo Gento".

La programo entenis : serĉpromenado kaj amuza vespero.

Pri la aranĝo mem, ĝia jes-aŭ-ne sukceso ni nenion povas diri, pro manko de informoj.

STOKKEM-DILSEN

Je sabato 28-a de junio 1980 okazos en Stokkem (Limburgo) la kvina "Internacia Somerpikniko" ĉe la Mozbordo.

La unua ideo rilate al tiu pikniko, antaŭ kvino da jaroj, estis kunvenigi Esperantistojn kaj simpatiantojn el la Mozovalo, de Maaseik ĝis Lieĝo.

Ĝia celo estis ĉefe uzi Esperanton kaj pruvi ĝian praktikeblecojn kaj krei amikan etoson inter Mozvalanoj.



Tamen la ideo interesis ne nur la Mozvalanojn, sed ankaŭ al personoj el la provincoj Antverpeno, Brabanto kaj Lieĝo, el la Kampinoj, el Nederlando kaj Germanio.

Tiel la pikniko iĝis - ĉiujare pli - interesa evento.

La ĉefa celo estis kaj estas kunesti, interkonatiĝi, interamikiĝi, sen paroladoj, en agrabla neformala etoso.

La ĉijara programo enhavas :

- kunveno je la 10-a horo matene antaŭ la preĝejo de Stokkem
- promenado - ĉi jare estos diversaj promen-eblecoj, tiel laŭ distance, kiel laŭ maniere.
  Eĉ surprizo ne malestos !
- pikniko ĉe la Mozbordo
- ludoj por infanoj kaj por "junaj" plenkreskuloj.

ESPERANTO STOKKEM atendas multajn partoprenontojn.

Partopreno estas senpaga. Nur unu sola kondiĉo : Sciigu antaŭ la 20-a de junio kiom-ope vi/via grupo partoprenos al :

Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL, Tel 031/49 50 06 (post la 19-a horo).

Ĉiu estas bonvena !

Korekto

En nia antaŭa novajletero, ni menciis ke la Grafika Centro en Antverpeno ekfunkciis je la 1-a de aprilo 1980.

Bonvole legu 1-a de aprilo 1979.

F.E.L.

Je sabato 10-a de majo la estraro de F.E.L. kunvenis en HASSELT en la Kultura Centro, kun kaj favore al la Limburgaj Esperantokernoj, Esperantistoj kaj simpatiantoj.

La diversaj facetoj de la movado priesploriĝis kaj decidoj pri la venonta agado en la provinco estis alprenitaj.

Pli detale la agado estos pridiskutata okaze de aparta kunsido inter la Limburganoj mem.

Pri la rezulto ni raportos poste.

F.E.L.-estraro sekvos la evoluon en Limburgo kaj decidos ĉu valoros la penon sugesti saman agadon en aliaj provincoj..

---------

Pro la fakto, ke dum la somera feri- kaj kongresperiodo (julio kaj aŭgusto) la estraro ne kunvenos en tiuj monatoj, kaj pro tio ke estas gravaj aferoj pridiskutendaj antaŭ ol ferii, la estraro decidis ne okazigi sian venontan estraran kunsidon en iu provinca sidejo, sed kunveni eu la hejmo de la prezidanto, Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT.

La kunsido okazos je sabato 14-a de junio ekde la 10-a horo matene.

En la tagordo estas inter alie la agaddosiero kaj la antaŭbuĝeto por 1981.

DIVERSAĴOJ

Laŭ - ankoraŭ ne konfirmitaj - informoj okazos en la monato junio Esperanto-ekspozicioj en St. Rita kolegio en Kontich kaj en Teĥnika lernejo en Merksem.

En Mortsel prepariĝas Esperanto-kurso en la Reĝa Ateneo ekde la venonta lernojaro.

La Naturborso en Antverpeno konis grandan sukceson. La Esperanto-stando, organizita kaj prizorgata de LA VERDA STELO kaj la GRAFIKA CENTRO de Antverpeno, ricevis multe da atento de la publiko.
Centoj da informpetoj kaj pluraj inskribiĝoj en la kurso ESPERANTO PROGRAM-ITA estis la rezulto.

Laŭ la Centra Oficejo en Antverpeno, la informpetoj lastatempe pli kaj pli oftiĝas.

Ni same konstatas ke pli kaj pli ofte aperas artikolojn pri Esperanto en la gazetaro.

GAZETARA SERVO - ALVOKO

Tute komprenebla unu aŭ kelkaj personoj ne povos solaj legi ĉiujn eperantajn gazetojn aŭ periodaĵojn.

Tial vi ĉiuj estas afable petataj eltondi ĉian artikol(et)on kiun vi trovas kaj sendi ilin al :

- pri la nederlandlingva gazetaro : Esperanto-Centro
  Arsenaalstrato 5
  2000 Antwerpen

- pri la franclingva gazetaro : Esperanto-Centro
  Montoyer-strato 37 b. 24
  1040 BRUSELO

Antaŭan dankon !

---------------

Vi konstatis, ke la nuna novaĵletero temas nur pri novaĵoj el Flandrio.

La kaŭzo ?

Kompleta manko de novaĵoj el la Franclingva landparto !

---------------------

Bijlage bij
Aldono al  E S P E R A N T O  -- JUNI 1980

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas  Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

ANTVERPEN.

Je la 30-a de majo, la Antverpena "LA VERDA STELO" ricevis la viziton de Heleno GOMEZ, Brazila maristo, okaze-e tre interesa prelego pri TOSKANIO (Italio) fare de F-ino Kristin TYTGAT el Mortsel.

La vizitinto volonte korespondos kun Belgaj Esperantistoj.
Jen lia adreso :

Heleno GOMEZ
Av. Venezuela n° 3, 15° ANDAR
N/M/ SERRA VERDE
20.000 RIO DE JANEIRO - Brazilo.

--------

Je 31 05 1980 fondiĝis en Antverpeno, en la festsalono de Café DRIEKONINGEN, Gemeentestraat, nova Esperanto-societo, nome F.A.B.E. (FLANDRA ASOCIO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ)

Kiel prezidanto elektiĝis Albert VAN DE WOUWER.

Festparoladis S-ro VAN DEN BERGHE, prezidanto de NOSOBE (Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj)
Li trovis, ke la fondo de F.A.B.E. estas historia tago en Flandrio kaj 'fajrero' por Eŭropo, unu paŝo pli en la direkto de pligrandigo de internaciaj kontaktoj.
Lia slogano : "Leer uw moedertaal goed en als tweede taal Esperanto" (Lernu bone vian lingvon kaj,kiel duan lingvon,Esperanton)

Post lia parolado li transdonis al la nova prezidanto luks-ekzempleron de 45-jara historio de NOSOBE.
Aliflanke li promesas, ke la Flandraj Blindaj Esperantist-oj daŭre profitos de favoraj kondiĉoj por la aĉeto de Esperantolibroj en brajlo.

S-ro VAN DIJCK, verkinto de la broŝuro "NE TIEL, SED ĈI TIEL" estas tre kontenta pri la aperigo de lia broŝuro. Ankaŭ li opinias, ke ni ĉefe bezonas komprenon kaj interkonsenton por konstrui pli bonajn Eŭropon kaj Mondon.

S-ro E. SYMOENS, prezidanto de F.E.L. prezentis rimarkindan prelegon pri la interna ideo de Esperanto. Pro ĝia speciala enhavo, ni reprenas ĉi tie la kompletan tekston :

" Dum la preskaŭ centjara ekzisto de Esperanto, la nocio "interna ideo" regule malaperas el la movado, sed ĝi same regule reaperas kaj vigligas la Esperanto-vivon.
Por kompreni ĝian signifon, ni konsideru antaŭ ĉio la fakton, ke la Internacia Lingvo ankoraŭ nuntempe estas vivanta, estas uzata, skribe kaj buŝe, evoluas normale, malgraŭ ĉiuj eblaj kontraŭstaroj, persekutoj, indiferenteco kaj eĉ aktiva malamikeco.
De kie ĝi eltiras tiun vivoforton? Nur klopodu ekspliki kial tiom da homoj dekmiljardekoj en plej malfavoraj cirkonstancoj oferis kaj ankoraŭ oferas sian tempon, sian trankvilon kaj sian monon al la progreso kaj disvastigo de tiu lingvo ...
Ĉu estas nur pro ĝia lingvistika valoro, ĝia belsoneco, ĝia simpleco? Mi opinias ke tio ne sufiĉas por mobilizi tiom da homoj kaj tiom da streĉado, ĉar ekzistas aliaj projektoj same valoraj, kiuj tamen ne sukcesas veki entuziasmon, sindonecon kaj dediĉon ĉe siaj adeptoj, se oni esceptas la Volapukanoj. Sed la entuziasmo de ĉi tiuj daŭris nur kelkajn jarojn kaj forfalis tiel rapide, kiel ĝi estiĝis. Kontraŭe, okulfrape eĉ por kontraŭstarantoj, estas la daŭreco kaj persistemo de la entuziasmo kaj la sindoneco ĉe la Esperantistoj. Kial do ?

Mi pensas, ke nur la idealo kiu akompanas la Internacian Lingvon kiel ombro (aŭ kiel aŭreolo?), kiu estas nedisigeble ligita kun ĝi, kiel korpo kaj spirito, povas iomete ekspliki tiun fenomenon. Nur alvoko al io neĉiutaga, al io supera, al io kiu levas la homon el la banaleco kaj la materialismo, povas vere mobilizi homajn fortojn.



Politikistoj bonege scias tion, kaj por kaŝi nurajn ekonomiajn, imperialismajn aŭ person-ajn motivojn, konvene kaj malkonvene ili alvokas al la batalo sub la flago de libereco, justeco, defendo de la vera religio aŭ de la patrolando ..
La nura malvarma racio neniam puŝas al grandaj realigoj; necesas por tio la varmeco de la koro, la alteco de la animo, la aspirego de la fantazio. Estas tiu varmeco de la koro, tiu animalteco kaj tiu fatazienverguro, direktitaj al siaj proksimuloj, kiuj instigis Zamenhof komponi sian lingvon, tiamaniere kreinte la bazon por universala interkomunikado, unua kaj necesa paŝo al pli granda kaj intima interkompreniĝo kaj eble amikeco inter malsamlingvanoj, malsamnacianoj.
Por la unua fojo en la historio, ĉi tiuj povos interkomuniki kiel lingve samrajtuloj, kiel nuraj homoj, ne kiel francoj, germanoj, italoj, grekoj, ĉinoj aŭ japanoj. Grava materia kaj precipe psikologia bremso foriĝis.

Ĉu estas nur romantika revo de nerealisma idealisto ? Tute ne, ĉar dum internaciaj renkontiĝoj ni ja persone spertas tiun senton, ni ja konscias pri la fakto ke homoj parolas kun homoj, ne nacianoj kun aliaj nacianoj. Artefaritaj limoj forfalas, la konscio ke oni apartenas al forta aŭ malforta, granda aŭ malgranda, influriĉa nacio aŭ lingvo, malaperas. Nur restas la veraj problemoj, esence propraj al la homoj, kiuj ekzistas inter fratoj, inter samlingvanoj.

Ni ja scias ke Esperanto ne estas LA solvo por ĈIUJ problemoj ! Ni ne estas tiel naivaj kiel oni kelkfoje pensas ! Ni nur scias ke Esperanto povas FACILIGI la interhomajn kontaktojn surbaze de lingva egaleco kaj samdigneco, ke ĝi estas unu el la multaj iloj por plihomigi la homojn, por forigi la forigeblan materiajn obstaklojn al interkomunikado, por anstataŭigi per interparolado la solvon per armiloj, do por krei favoran etoson al interhoma komunikado, unua paŝo al internacia paco.

La kredo en tiu ebleco, la strebado al tiuj pli homaj kaj amikaj interrilatoj pere de la Internacia Lingvo nomiĝas la Interna Ideo. Ĝi estas la forto kaj la fajro kiu vivtenas la Esperanto-movadon, kiu daŭre inspiras kaj entuziasmigas novajn generaciojn de homoj ĉiuspecaj tra la mondo kaj kiu permesas venki ĉiujn obstaklojn. Se vi volas, ni nomu ĝin realisman idealon !

E.S.

---------

U.K. 1982

La 4-an de juni 1980 fondiĝis en Antverpeno la "ASPC 67-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO" (67ste WERELDCONGRES ESPERANTO)
Elektiĝis kiel :
- prezidanto : Senatano PIOT el Loveno
- Anstataŭa prezidanto : Edward SYMOENS el Kalmthout
- Sekretario : Roger DE SCHEPPER el Wilrijk
- Kasisto : Erhard BOEHME el Stabroek
- Revizoro : Jules VERSTRAETEN el Hoboken
- Administranto : Wim DE SMET el Kalmthout

- Sidejo : Arsenaalstraat 5, B-2000 ANTWERPEN.

Laŭ regularo de U.E.A. la L.K.K. devas starigi garantian kapitalon kiu estas uzata nur en kazo de deficito. Kutime, tio okazas per subskribo de la landaj esperantistoj de promesoj de po 25 gld.

L.K.K. alvokas la Belgan esperantistaron subskribi grandskale al tiuj promesoj, montrante tiamaniere al la estraro de U.E.A. ke ĝi subtenas la 67-an U.K.-n en 1982 kaj fidas al ĝia sukceso.

(raportis R. De Schepper, sekretario)

---------

EUPEN

Ekde la venonta lernojaro, okazos en la Eŭpena Reĝa Ateneo, Esperanto-kursoj

en la 4-a kaj 5-a lernojaroj en la bazainstruado. La "start"-ideo tiurilate venis de la gepatroj mem de la gelernantoj (kompreneble sub instigo de la nelacigebla S-ino L. VERTONGEN). Ili nome opinias, ke pli bone estus se la infanoj, ĉe la forlaso de la baza lernejo, jam dum tri jaroj ricevis Esperanto-instruon.

Sabaton 31-a de majo okazis en tiu sama lernejo Esperanto-ekspozio, prizorgita de la Esperanto-lernantoj.

--------

HUY

Tre ĉagrena novaĵo venis el Huy, kie Ges-roj BORGUET perdis siajn sol-filon kaj bofilinon, pro aviadila akcidento, okazinta je 23 05 1980.
Ili postlasas du infanojn, 11 kaj 15 jaraj.
Al la postrestantoj ni prezent-as nian sinceran kondolencon kaj amikecon.

--------

LEUVEN

Je dimanĉo 13-a de julio 1980 okazos en LEUVEN SERĈPROMENADO (kiu el tio volas fari ŝercpromenadon, povos!).

Temas pri ne tro longa promenado (+ 4 km.) tra la urboparto inter Namura- kaj Brusela stratoj (Naamse en Brusselsestraat).

Foriro inter la 10-a kaj 14-a horoj.

Kotizoj : partopreno : BF 50; partopreno kun atesto : BF 70.

Multe da premioj atendos vin tie.

--------

MORTSEL

Laŭ laste ricevitaj informoj okazos, ekde septembro 1980, Esperanto-kurso en la Reĝa Ateneo de Mortsel kadre de la vesperkursoj.

Informoj, inskriboj ktp ĉe S-ino Paŭla TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8, 2510 MORTSEL aŭ en la redaktejo de ESPERANTO EN BELGIO.

--------

## U.E.A. - Komitatanoj B

Ĉu ni povas memorigi vin, ke inter la kandidatoj estas Belgo ? Nome D-ro Wim De Smet. Voĉdonontoj bonvole ne forgesu lin.

-----------

Bijlage bij
Aldono al E S P E R A N T O SEP. 1980

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

ĜENERALE - MOVADE

65-a U.K. en Stokholmo.

La ĉi jara U.K. estis por la Belga Esperanto-Movado unu el la plej signifaj el la historio. Ne nur akiris ni la UEA-prezidanto, sed liveris ne malpli ol sep kunlaborantoj en la komitato/estraro. Plie, ni akiris unu honora membro de UEA.

Jen la kunmeto de la Belga reprezentantaro en U.E.A. :
- Prezidanto de U.E.A. (1980-1983) : Gregoire MAERTENS
- ESTARO : Paul PEERAERTS, Direktoro de la Grafika Centro en Antverpeno,
  Elisabeth KEHLET ( ne estas Belgino, sed loĝas en Belgio. Ŝi respondecos pri la Universalaj Kongresoj)
- KOMITATO : Komitatanoj A : Lambertine DREZE
  Edward SYMOENS
  Komitatano B : Wim DE SMET
- KOMISIONOJ : - pri edukado : Jan BOVENDEERD
  Germain PIRLOT
  - pri eksteraj rilatoj : Gregoire MAERTENS
  - pri financo kaj administrado : Gregoire MAERTENS
  - pri informado : Wim DE SMET
  Edward SYMOENS
  - pri kultura agado : Wim DE SMET
  - pri virina agado : Elisabeth KEHLET
- HONORA MEMBRO : D-ro Pol DENOEL

Al la (nia) nova prezidanto ni elkore gratulas kaj deziras , al li kaj al liaj kunlaborantoj, plenan sukceson.

Pri la kongreso mem, vi certe sufiĉe legos en la cetera E-o-revuaro.

B.E.F.

Je venonta 4-a de Oktobro geedziĝos nia B.E.F.-prezidanto Marc DEMONTY kaj lia ĉarma fianĉino Anne SEGHERS. La solenaĵo okazos en la Preĝejo de la Resurekto en St. Jans Molenbeek.
Festadreso : "t Wilgenhof", Rosweg 79, 1681 St Martens Lennik.

Al Marc kaj Anne ni deziras tutkore sanon, prosperon kaj ĉion necesan por esti feliĉaj.

------

Post kelktempa silento rilate al nacia kongreso, B.E.F. verŝajne denove kongresos, ĉi foje sub la nomo de "FEDERACIA KONGRESO", je sabato 25-a de Oktobro en Lieĝo, Hotel de la Couronne, Place des Guillemins 11-13.
En la programo estas jam jenaj punktoj :
- antaŭtagmeze ekde de 10-a horo : estrarkunsido de B.E.F.
- posttagmeze, ekde la 14-a horo : ĝenerala asembleo de B.E.F.
Pri la ceteraj programeroj ni informos poste.
Ni dankas al niaj Lieĝaj amikoj pro ilia preteco organizi tiun ĉi unuan kongreson.

B.E.F. denove kongresos en 1981 je la 26-a de Septembro en Bruselo.

-----

Ĉu tiuj ĉi aranĝoj renkontiĝas kun la deziroj de nia antaŭa, nun honora, prezidanto?
Certe jes !
Cetere, ĉu ni jam gratulis lin pro lia honorado, tiel en B.E.F. kiel en U.E.A.?
Se ne, jen do !

------

TROFEO FYNE

Ke B.E.F., okaze de la U.K. en Lucerno, ricevis la Trofeon FYNE por 1979 kaj 1980 jam ne estas sekreto.
Laŭ la regularo, tiu trofeo devos esti aljuĝita al iu Belga grupo.
Por eviti ĉiun eblan privilegiadon aŭ ŝajnan privilegiadon, B.E.F.-estraro proponas ke ĉiu grupo kiu kandidatiĝas por la trofeo, sendu al la sekretario de B.E.F. raporton pri sia agado inter 01 08 79 kaj 31 07 80.
Ĝis nun envenis unu raporto:de la E-o grupo VERVIERS.

------



A.P.E. kaj F.E.L. intencas plialtigi siajn kotizojn por venonta jaro, konsiderante ke, se dum la lastaj kvin jaroj la kotizoj ne ŝanĝiĝis, la inflacio tamen atingis + 30 %.
Kompreneble pri la novaj kotizoj decidos la ĝenerala asmebleo, por A.P.E. la 6-an de Septembro, por F.E.L. en Oktobro, dato ankoraŭ ne fiksita.

--------

F.E.L.

La prezidanto de F.E.L., E. Symoens, reprezentis en Bruselo, de 23 ĝis 27 06 80, I.L.E.I. kaj U.E.A. en Monda Forumo de Internaciaj neregistaraj asocioj, okaze de la 70jara ekzisto de la Unuiĝo de Internaciaj asocioj. Trifoje en ĝenerala kaj komisionaj kunvenoj kaj skribe en la taga bulteno, li atentigis la internaciajn ĉeestantojn pri la solvo per Esperanto de la lingvaj malfacilaĵoj, por kiuj oni vane serĉas alian solvon... Pluraj personoj petis plajn informojn kaj la reprezentanto de I.L.E.I. kaj U.E.A. kunportis multajn dokumentojn el la Internaciaj medioj.

-------

La HOGER INSTITUUT VOOR TOLKEN EN VERTALERS de la Antverpena Universitato ĵus ricevis gravan donacon de 100.000 svisaj frankoj de Svisa fondaĵo por helpi antaŭenigi la studon kaj disvastigon de Esperanto. En Septembro la prezidanto de F.E.L. priparolos kun la direktoro kaj subdirektoro, profesoroj GODFRIEND kaj DE CORT, praktikan kaj konkretan laborprogramon por la venontaj tri jaroj. Tiuj kiuj havas ideojn aŭ sugestojn tiurilate al eblecoj en la kadro de tiu instituto, bonvolu komuniki ilin.

-------

F.E.L. iniciatis larĝskalan transliman agadprogramon. Pli ol cent kvindek leteroj kaj antaŭprojekto rilate al konreta, samtempa agado ekde Septembro 1981 en kiel eble plej multe da landoj estas senditaj al diversaj Esperanto-asocioj kaj individuaj Esperanto-aktivuloj.
Informoj kaj dokumentoj pri tiu ĉi grava projekto estas havebla rekte ĉe S-ro E. SYMOENS, Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT, tel 031/66 62 66.

--------

La estraro de F.E.L. kaj I.L.E.I. denove INSISTAS, por ke ĉiuj organizontoj de kursoj komuniku kiel eble plej rapide sekvantajn informojn al la sekretario, Arsenaalstraat 5, 2000 Antwerpen :
Nomo kaj propra nomo de la kursgvidanto
Loko, tago, horo
Kurslibro
Nomoj kaj adresoj de la gekursanoj (se eble naskiĝdato) kaj profesio.

F.E.L. kaj I.L.E.I., tamen ne sen antaŭa konsento de la kursgvidanto !, klopodos sekvi kaj kuraĝigi la gekursanojn dum la tuta jaro.

-------

AALST

La grupo de Aalst anoncas ke ekde Septembro denove okazos E-o kursoj en Kattestraat 31, 2-a etaĝo. Informoj ĉe M. DE WIT, Nonovestrato 157, 9440 Erembodegem.

-----

ANTWERPEN

Laŭ tre "recentaj" informoj, la respondeculoj de la E-ogrupoj el la Antverpena Provinco intencas kunveni ja sabato 4-a de Oktobro en la Esperanto-Centro de Antverpeno, Arsenaalstrato 5, por priparoli la estintan agadon kaj priesplori plibonigi estonte komunan agadon en la provinco.

--------

HAM SUR HEURE

Je dimanĉo 6-a de julio okzis en Ham sur Heure ĉe Ges-roj PAULUS la 8-a Renkontiĝo . La programo entenis i.a. piknikon, agrablan komunan tagmezon, turisman filmon kaj prezentado de siaj talentoj de TRIXINI, la Magiisto kun blua ŝtono.
Partoprenis reprezentantoj de ĉiuj E-ogrupoj el Valonio samkiel diversaj Flandroj.
Eĉ unu eksterlandano - Usonano! - partoprenis.

Belega tago!

--------

KORTRIJK

Je sabato 16-a de Aŭgusto, niaj geamikoj el Kortrijk, Ges-roj C. VANBIERVLIET festis sian 50-jaran geedziĝtagrevenon.
Al Ges-roj VANBIERVLIET ni elkore gratulas.

°°
°

LEUVEN

Je dimanĉo 13-a de julio, ESPERANTO 2000 el Loveno organizis sian 2-an serĉpromenadon. Partoprenis 100-o da personoj, inter kiuj ne tro da Esperantistoj !
Pri la fina rezulto de la promenado, ne ankoraŭ nenion aŭdis.

-------

LIEĜO

Kunlabore kun la Kultura Komitato de XHORIS, Lieĝe Esperanto okazigos la ĉijaran Aŭtunan Trilandan Renkontiĝon (Belgio, Germanio, Nederlando) en FERRIERES, Belgio? je la 18-a kaj 19-a de Oktobro.
La programo estas pli ol sufiĉe garnita per agrablaj eroj.
Informoj ĉe Freddy BOSMANS
Route de Comblain 27
4183 FERRIERES (XHORIS)

--------

LIMBURGO

Je sabato 20-a de Septembro, la respondeculoj de la Esperanto-grupoj el la provinco Limburgo (Beringen, Hasselt, Stokkem, Tessenderlo) "kunmetos siajn saĝajn kapojn por priesplori la eblecojn pri komuna agado provincnivela.
La kunveno okazos en KASTELO de ORDINGEN en St. Truiden ekde 11.30 h.
Speciale en tiu kunveno estas, ke ĝi okazos ĉirkaŭ riĉe garnita manĝotablo (ĉu ebla venonta nova kunven-metodo ?).

Pri la ruzultato de tiu kunveno ni informos poste.

-------

STOKKEM

Je sabato 30-a de junio okazis en Stokkem la kvina Internacia Somerpikniko. Partoprenis 60-o da personoj, kvankam sin anoncis pli ol 100. Tamen la vetero certe retenis la aliajn. Nome, pluvis (pluvegis eĉ momente) dum la tuta tago, tiel ke la preparitaj festaj aranĝoj ne povis okazi.

Malgraŭ ĉio, ni havis la impreson, ke la ĉeestantoj certe ne malpli bone amuziĝis ol la antaŭaj jaroj. Nun ili ja havis la okazos (ne alia elektebleco !) resti kune interne de la piknikejo kaj do pli bone interrilati unu kun la aliaj.

Menciinde tamen estas ke je la 3-a horo posttagmeze alvenis kuraĝulo el Gento. Li dum pluraj horoj veturis vagonare kaj aŭtobuse por alveni en Stokkem !

Bedaŭrinde ni ne notis lian nomon kaj tiel ne povis speciale gratuli lin pro lia kuraĝo. Ni faros tion do laŭ tiu ĉi vojo.

------

SUD-AFRIKO ... ĉu en Belgio ? Komprenoble ne, sed ...

Antaŭ unu jaro forvojaĝis el Antverpeno, kune kun sia edzo Paulus, membrino de LA VERDA STELO al Sud Afriko - Botswana - por tie labori kadre de la "Helpo al la Tria Mondo".
Temas pri Lieve JACQUES el Antverpeno.

Ŝi sendis al ni, speciale por nia bulteno, artikoleton pri Botswana, kies aperigado ni kompreneble ne povas rifuzi. -Tamen, mankas la necesa loko por ĝin publikigi nun. Tial ni proponas fari tion en venonta numero.

Intertempe ni gratulas al la Ge-Lieve-j pro ilia kuraĝo kaj deziras al ili agrablan restadon kaj revenon en bona sano en 1982.

--------

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Bijlage bij
Aldono al E S P E R A N T O OCT. [illegible]

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

## A.P.E.

Je sabato 06 09 1980 okazis ĝenerala kunsido de A.P.E. en la Kulturdomo de Huy.

Ĉeestis nur malmulte da reprezentantoj, ĉu eble pro la fakto ke la prezidantino estis petinta kandidatojn por la komitato ?

Krom la reprezentantoj el Valonujo, ĉeestis la kasisto kaj sekretario de B.E.F. samkiel la direktorino de Eldonejo SONORILO kaj la vic-prezidanto de F.E.L. Krome ĉeestis S-ro Baŝef el Moskvo, gasto de S-ro Van Breuse.

Firmaj decidoj ne estas prenitaj dum tiu kunveno. Komprenebla afero, se oni konsideras ke la prezidantino formis la tutan komitaton depost la eksiĝo de la sekretario (S-ro Destabelle) kaj de la kasisto (S-ro Nizet).

Fine, estraro kunmetiĝis, kvankam provizora, sed preskaŭ certe, stabila
- prezidantino : F-ino L. DREZE
- sekretario : S-ro Cl. THOLET
- kasisto : S-ro Ch. NORGA

Ĉiuj tre seriozaj kaj laboremaj homoj.

Bezoniĝas pluaj komitatanoj, kaj ni esperas ke la prezidantino baldaŭ trovos ilin.

## B.E.F.

Rilate al la oktobra "FEDERACIA KONGRESO", niaj Lieĝaj amikoj konsentis prizorgi kroman programon por la homoj kiuj emas veni antaŭtagmeze, dum la - ne publika - estrarkunsido.

Tiu programero dependas, kompreneble, de la vetero.

## BRUSELO

Je merkredo 24-a de septembro, S-ro G. MAERTENS, nova prezidanto de U.E.A., estis omaĝita de Europa Klubo kaj de kolegoj el la ministeria kabineto.

D-ro Wim De Smet, prezidanto de Eŭropa Klubo, diversaj altranguloj de la Ministerio, kiel ankaŭ Profesoro BOULANGER, la preziadnto de F.E.L., kaj reprezentantoj de F.L.E.J.A. kaj B.E.F.A. festparoladetis.

En sia respondo, S-ro Maertens emfazis, ke lia elekto ne estis fremda al la situacio en Belgio.

Pro lingvaj kialoj, la Belgoj estas devigataj trovi ekvilibron kaj ĝuste tio definonila elektin toj en Stockholmo : S-ro Maertens estas ekvilibra homo, kaj tial taŭgas por la posteno.

La vespero pludaŭris kaj finiĝis en tre agrabla, tipe "belga" etoso.

## F.E.L.

### Antverpeno:

Dum la Universala Kongreso en Stockholmo okazis "io kaj alia" en Antverpeno. Nome, dank'al la persisteno de la "Verdstelanoj" kaj kun la financa helpo de Institucio HODLER, aĉetiĝis domo apud unu el la ĉefaj bulevardoj de la urbo.

Tiu domo kiu estos disponebla ĉirkaŭ la fino de ĉi-jaro kaj, post aro da necesaj adaptolaboroj, preta por la uzado en la unua duono de la venonta jaro, loĝigos la Grafikan Centron de U.E.A., la Flandran Esperanto-Centron kaj ankaŭ LA VERDA STELO-n

## LETERO AL SENSPERTA ESPERANTISTO

Kara amiko,

Mi ege konsilas al vi ĉeesti Universalan Kongreson (U.K.), ĉar ĝi estas la plej grava manifestacio por esperantistoj. Ĉi-jare ĝi okazis en Stockholm de la 2-a ĝis la 9-a de Aŭgusto. Ĉiujare ĝi okazas dum unu semajno ĉirkaŭ la fino de Julio kaj la komenciĝo de Aŭgusto. En Stockholm kunvenis 1.800 homoj el 51 nacioj: evidente estis ideala loko por ekkoni eksterlandanojn. Ĉiufoje, kiam mi sidis aŭ vagadis en la haloj, mi trovis novan amikon. Se vi iam intencas partopreni Universalan Kongreson, vi planu konatiĝon kun la urbo kaj la ĉirkaŭaĵo antaŭ aŭ post la kongreso. Nepre liberigu vin kiel eble plej multe por plene ĝui la kongreson. La organizantoj (oni parolas pri L.K.K., tio signifas Loka Kongresa Komitato) organizis kvin ekskursojn en la kongresa semajno. Sed nur dum unu tago la kongresaj laboroj ĉesis por ekskursi. Dum la ses aliaj tagoj mi povis elekti inter pli ol 150 programeroj en 15 diversaj salonoj. La programeroj estis nekredeble variaj. Mi ĉeestis aron da koncertoj, teatroprezentadoj, prelegoj ... kiujn ni neniam povos aŭdi kaj vidi en nia loka klubo. Sur la aliaj paĝoj vi povas legi detalojn pri tio. Sed por havi ideon pri la nivelo de la kulturaj programoj, mi konsilas al vi aŭskulti la diskon de Vesilin Damjanov (vi povas aĉeti ĝin ĉe la libroservo de U.E.A.). Li kantis ĉi tie dufoje. Sed imagu ke eble dudek profesiaj artistoj venis sur la scenejon. Mi speciale ĝuegis la pupteatroprezentadon de pola grupo "Rabka". Tiun vesperon ĉeestis ankaŭ la infanoj de la infankongreseto. Mia filo estis ege kontenta pri la tuta aranĝo. Car tie oni akceptas infanojn 6 ĝis 12-jaraj ankaŭ vi povas ekde nun instrui Esperanton al viaj gefiloj kaj aligi ilin. Tiam vi mem estas libera por ekzemple konatiĝi kun multaj fakgrupoj, por aŭskulti prelegojn kaj partopreni diskutgrupojn pri la kongresa temo, kiu estis ĉi-jare "diskriminacio". Ĉar la publiko dividiĝis en malgrandaj rondoj, ankaŭ mi ĉi-foje kuraĝis diri mian opinion. Pli spertaj amikoj ĝuis la Internacian Someran Universitaton. Sed tio ŝajnas esti tro malfacila por mi.

Alia interesa ebleco estas konatiĝi kun la laboro de Universala Esperanto Asocio. Mi, kaj ĉiu ajn kongresano, rajtas ĉeesti la komitatajn kunsidojn. U.E.A. estas gvidata de Komitato kaj de Estraro. Por havi ideon pri ilia signifo, mi komparu la komitaton kun parlamento kaj la estraron kun registaro en demokrata ŝtato. La roloj de registaro kaj parlamento jo ege varias de ŝtato al ŝtato. Mi povas diri, ke la komitato de U.E.A. havas tre gravan rolon. Ĝi i.a. (inter alie) elektis novan estraron ĉi jare. La nomojn vi trovas aliloke. Mi devas klarigi al vi, ke la antaŭa prezidanto (Humphrey Tonkin) ĝuis ankoraŭ grandegan simpation. Sed la statutoj de U.E.A. difinas ke prezidanto rajtas resti prezidanto nur dum 6 jaroj. Tio garantias daŭran renoviĝon de ideoj, freŝaj fortoj.... Ĉu tiun re-

gulon vi ne povus transpreni por via loka klubo aŭ landa asocio?
Kara amiko, mi forgesis eĉ mencii serion da programeroj kiel bankedo, balo, akcepto en la urbodomo, diversaj kursoj.... Kongresi signifas vivi intense, laciĝe, dormi malmulte .... Sed mi eltenis, ĉar mi pripensis, ke mi devos atendi minimume unu jaron antaŭ ol ĝui similan abundon da travivaĵeblecoj.

Amike via,

I.P.

BOTSWANA

Botswana estas lando kiu situas inter Sud-Afriko, Zimbabwe, Zambia kaj Namibie. Ĝi estas iom pli granda ol Francio kaj havas 700.000 enloĝantojn. Tre granda parto de la lando estas dezerto, nome la Kalahari dezerto (aŭ en Setswana la "Kgalagadi" (prononcu kĥalaĥadi)).
Botswana sendependiĝis en 1966. La ĉefurbo estas Gaborone kiu ekkonstruiĝis post la sendependiĝo kaj do estas sufiĉe moderna urbo. La lando havas ege multe da spaco pro la malgranda populacio. Tial oni sukcesis fondi plurajn sovaĝbestajn rezervejojn.
La unuaj enloĝantoj estis la buŝmanoj. Nuntempe nur 4000 el la 26.000 buŝmanoj vivas laŭ la tradicia maniero. Ili vivas de la ĉasado en la dezerto. Ili parolas propran lingvon kaj havas propran kulturon. La aliaj enloĝantoj de Botswana (nome la Batswana) alrigardas la buŝmanoj kiel primitivuloj kaj malinteligentuloj. Tamen tiuj buŝmanoj scias postvivi en malfacilaj cirkonstancoj. La lando ofte suferas sub senpluveco kaj tamen la buŝmanaj triboj sukcesas vivteni sin. Ili estas vera naturpopolo.
Botswana estas sufiĉe riĉa lando. Ĝi tie estas la 2a granda diamantminejo de la mondo. Krome estas grandega viandindustrio (700.000 enloĝantoj - 3.500.000 brutoj). Tamen granda parto de la enloĝantoj malriĉas. Estas granda senlaboreco, tio nun eĉ malpliboniĝas ĉar Sud-Afriko resendas la Batswanaj gastlaboristoj kiuj laboras tie en la minoj. (En 1976 40.000 Batswana laboris en Sud-Afriko, en 1978 nur 23.000.)
En Botswana laboras sufiĉe multaj eksterlandanoj. En 1979 oni kalkulis 1200 eksterlandanoj el kiuj 400 volontuloj. Tio signifas 1 eksterlandano por 100 familioj (± 6 personoj). Tio estas kredeble la plej alta cifero en la tria mondo.
Granda parto el la volontuloj laboras en la tiel nomataj "brigadoj". La "brigado" movado fondiĝis ĉar la formala eduksistemo ne sufiĉis aŭ tro multe kostis. La fundamentaj principoj de la "brigado" movado estas tiel:

1. Doni fakedukadon, por homoj kiuj finis elementan lernejon, ekster la formala eduksistemo.

2. La fakoj estas elektitaj laŭ la bezonoj de la regiono. La ĝenerala celo estas kamparevoluo per edukado en profitdonaj fakoj.

3. Edukado kaj produktado kombiniĝas tiel ke la vendo de la produktoj estas uzata por pagi la edukkostoj.

nia nova Esperanto vorto por tio (kostregajna principo. red)

(principo "cost covering")

4. Pere de la teoria- kaj faka edukado, en la klaso kaj dum la produktado, fakuloj edukiĝas. Tiel la brigadoj helpas en la evoluo de la lando.

Eventuale Botswana ne plu estas vera tria monda lando, ili ankoraŭ bezonas multe da helpo. Sed ĉiam restas la danĝero ke ni donas tro da Eŭropaj ideoj kaj kutimoj. Pro la dependeco de Botswana al Sud-Afriko ili konas la Eŭropajn luksaĵojn kaj bonajn flankojn sed ili ne scias pri la malbonaj aferoj en la unua kaj dua mondo.

Lieve Jacques



Tiu ĉi akiraĵo, kie do centraliziĝos la Esperanto-movado de Flandrio, estas feliĉa solvo por niaj administraj problemoj kaj certe ebligos pli koheran (kun)laboron.

--------

La oficiala Esperanto kurso en Quellinstrato ne konis tiel bonan rezultaton kiel pasintan jaron.

Anstataŭ trioble la kvanton necesan, kiel en 1979/1980, prezentiĝis nun apenaŭ sufiĉe da lernantoj por atingi la minimuman kvoton.

Ni esperu por la organizantoj ...

--------

Komuna kunsido de la Esperanto-grupoj el Antverpeno :

Je sabato 4-a de oktobro 1980, por la dua fojo ĉi jare, kunvenis la respondeculoj de la Esperanto-grupoj el la provinco Antverpeno. Almenaŭ, tio estis la intenco. Kunvenis nur tiuj el la Antverpena aglomeracio.

Decidiĝis fari ĝenion novan en la nuna momento, konsidere al la Universala Kongreso 1982, kiu postulos ĉies kunlaboron, sed por la ĝenerala agado, ĉiuj kunlaboros kaj kontribuos en la kostoj, dum la loka agado, kie tiu ekzistas, pludaŭros.

Plie proponiĝis okazigi du fojojn jare ĝeneralan kunsidon, ĉefe por interŝanĝi spertojn kaj por kunordigi la ĝeneralan kunlaboron sed kompreneble ankaŭ por ne perdi kontakton kun la aliaj grupoj el la provinco.

LIMBURGO

Je sabato 20-a de septembro kunvenis en St. Truiden, en "Kastelo - Komanderio de Ordingen", la ĉefrolantoj el la provinco Limburgo.

Decidiĝis venonte centralizi la agadon el la provinco, sub la kontrolo de S-ro Guido SCHROEYERS, kiu do funkcios kiel oficiala kontaktpersono inter F.E.L. kaj la Limburgaj grupoj/membroj.

La sidejo de Limburga Esperanto-Movado venonte estos :

ESPERANTO LIMBURG
Justus Lipsiuslaan 26
3500 HASSELT
Tel. 011/22 74 23

Kiel provinca estraro proponiĝis (devas ankoraŭ esti aprobita de la membroj)

- Honora Prezidanto : Pastro A. BECKERS
- Prezidanto : S-ro Jozef CHRISTIAENS
- Sekretario/Kasisto : S-ro Guido SCHROEYERS.

Negativa punkto estis, ke ni devis konstati ke en Limburgo la revuoj ESPERANTO, HEROLDO DE ESPERANTO kaj MONATO ne estas konataj ? ? !

MORTSEL

Io neatendita okazis en Mortsel.

Je mardo 23-a de septembro, ESPERANTO MORTSEL organizis informvesperon kun provleciono en la Reĝa Ateneo de Mortsel. Ĝi estus sekvota de regula Esperanto-kurso ekde 30-a de septembro.

Partoprenis la informvesperon 30-o da personoj, el kiuj 16 enskribiĝis al la kurso.

Tamen grandega estis la surprizo kiam, okaze de la tria kursovesparo, sin prezentis ankoraŭ ses novaj lernantoj.

Fakte la kursgvidanto iomete malesperis pro la granda nombro kaj volus dividi la grupon en du partoj. Tamen la kostoj kaj eblecoj devigis lin daŭrigi kun la tuta grupo. Cetere, du el la lernantoj, veninte el la centro de Antverpeno, konsentis sekvi la kurson en Quellinstrato.

Esperu ni, ke ne temas pri la "pajlofajro".

--------

ESPERANTO MORTSEL sin preparas ankaŭ al la festado de Zamenhofvespero, komence de decembro. Detaloj sekvos.

ĜENERALE

Kun ĝojo, kvankam kun iom da - cetere agrabla - miro, ni trovis informojn pri Belgio en la Ĉeĥa Esperanto-revuo STARTO; informojn ĉerpitaj el nia bulteno ESPERANTO EN BELGIO.

--------

En HEROLDO DE ESPERANTO ni legis ke en julio venontjare okazos unumonata aŭtobus-vojaĝo tra 15 Eŭropaj landoj. Belgio estos inter ili. La vizito al nia lando okazos dum la dua etapo, kiu situas de 04 ĝis 08 07 81.

Ni klopodos scii iom pli, inter alie pri la vizitotaj urboj, ekzaktaj datoj ktp. Niaj legantoj estos ĝustatempe informitaj, almenaŭ se ni ricevos la necesajn informojn.

LASTAJ NOVAĴOJ

XHORIS - 3 LANDA RENKONTIĜO

Je sabato 18 -a kaj dimanĉo 19-a de oktobro okazis en XHORIS TRI LANDA RENKONTIĜO kiun partoprenis 60-o da Belgoj, Germanoj, Nederlandanoj kaj Britoj.

Sabate okazis i.a. tre bone sukcesinta distra vespero.

Dimanĉe la partoprenantoj ĝuis belegan, sunoplenan promenadon en la plena naturo.

Ankaŭ diservo dulingva - Franca/Esperanta - kun prediko en Esperanto fare de Pastro MULLER, faris tre bonan impreson.

Plie, por Belgoj tre grave : la manĝaĵoj estis bongustaj kaj abundaj.

La sekvonta Tri-Landa Renkontiĝo okazos en aprilo/majo 1981 en la Germana turista urbeto MONSCHAU.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Bijlage bij
Aldono al ESPERANTO - DEC. [illegible]

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

B.E.F.

FEDERACIA KONGRESO.

Je sabato 25-a de oktobro 1980, okazis en Liêĝo, "Hotel de la Couronne", la unua Federacia Esperanto-Kongreso de Belgio.

Okazis du kunsidoj : estrara (ne publika) kaj ĝenerala, el kiuj ni retenas ke la financa situacio ne estas brila, ke la estraro vere baraktas por trovi ekvilibron, ke la ŝtataj subvencioj estas blokitaj, tiel ke por la ĉiam kreskantaj elspezoj, B.E.F. ne ricevas aldonan subtenon.
Necesas do trovi aliajn financeblecojn, sed,pro tio ke la estraranoj, kiom bonvolaj ili ankaŭ povas esti, ne estas veraj ekonomistoj, la situacio restas tre necerta, krom se troveblas ekonomisto por okupiĝi pri la necesa financplanado.
B.E.F.-estraro serĉas do kaj invitas ĉiun serĉi kun ĝi, personon kiu povas kaj pretas ! prizorgi tiun parton el la estrara taskaro.

--------

Do, kara leganto, se vi estas tiu persono aŭ se vi konas iun tian, bonvolu urĝe konatiĝi vin aŭ lin/ŝin.
Dankon.

--------

En la estaro vakas la posteno de ĝenerala sekretario. Pro (aŭ eble dank'al ?) la nuna pli vigla agado sur regiona tereno, la laboro iĝas tro por unu sola sekretario por du asocioj (B.E.F. + F.E.L.) Urĝas do trovi personon preta por funkcii kial ĝenerala sekretario por la B.E.F.-aferoj, t.e. por kunordigi la agadon de la du region aj asocioj (A.P.E. kaj F.E.L.).

Se la antaŭenigo de Esperanto ankaŭ estas via celo, ne kaŝu vin do, sed prezentu vin por kunlabori.

Ĉi tie same, se vi interesiĝas pri la afero aŭ konas iun, kiu povas esti pri-konsiderata tiel, bonvolu sciigi tion al B.E.F.-prezidanto, Marc DEMONTY, Av. des Missionnaires 39 b.5 1080 Bruselo.

La laborplano estas sufiĉe vasta, sed povas esti realigita nur kun la kunlaboro de la regionaj asocioj.

Aliflanke, S.U.K. ( Someraj Universitataj Kursoj) petis materian kaj financan helpon al B.E.F. Pro la malbona situacio sur financa tereno, financa helpo ne estos ebla. Tamen B.E.F. promesis propagandi la aferon kaj instigi al persona aliĝo al S.U.K. Ekde kiam ni ricevos la necesajn informojn rilate al la aliĝkondiĉoj ktp. ni raportos pli detale pri la afero.



TROFEO FEYNE

B.E.F. gajnis la trofeon Feyne por 1979/1980 kaj devis ĝin aljuĝi al tiu grupo, kiu plej bone agadis kadre de la ĝenerala Movado. La tasko ne estis facila, i.a. jam pro la ekzisto de du regionaj asocioj.
La estraro tamen trovis solvon kaj aljuĝis la trofeon al du grupoj : Antverpeno (F.E.L.) kaj Liêĝo (A.P.E.).

ESPERANTO EN BELGIO.

Sub la instigo de la nova prezidanto de U.E.A., ni intencas plibonigi nian bultenetom kaj enmeti ankaŭ lingvajn aldonojn kaj tempopasigajn ludojn.
Tamen, tio eblos nur se estos kunlaboro !
Ni ne forgesu; ke la bulteno ĝis nun estas la laboro de unu sola persono, kiu jam apenaŭ trovas la necesan tempon por raporti pri la novajoj kiujn li laŭ ia aŭ alia maniero akiras.
Ĝis nun kunlaboro venis el Bruĝo, nome S-ro Roger Iserentant pretis prizorgi la krucvortenigmon, kiun vi trovos en la fino de la bulteno.

-----

La plej elstara momento de la ĝenerala kunsido estis la omaĝo al S-ro Maertens, kiel prezidanto de U.E.A. kaj la transdono al li de mondonaco de BF 500.000,- fare de S-ino ERNST el Bruselo.

Plie, por la grupoj ege interesa novaĵo estas, ke venonte eblos sendi filmojn por la klubvesperoj pere de S-ro DE BRUYNE, Schotlandstrato 73, 1060 Bruselo, Tel. 02/538 71 66.

------

A.P.E.

La nova kaj definitiva komitato estas :

| | |
|---|---|
| Prezidantino | F-ino L. DREZE, rue Louvrex 105, Liêĝo 041/23 17 21 |
| Sekretario | S-ro C. THOLET, rue des Hineux 54, Herstal 64 02 71 |
| Administranto/Kasisto | S-ro P. BINOT, r.C. de Paepe 18, VIVEGNIS |
| Komitatano | S-ro C. MORGA, r. Tivoli 18, ANDRIMONT |
| Informa Fako | F-ino A. ORSOLINI, r.P.Pastur 6, CHARLEROI |

Ni deziras al tiu komitato plenan sukceson en sia agado.

-------

F.E.L.

Je 14 11 80 okazis en Bruĝo, Middenstandshuis, ĝenerala kunsido de Okcident-Flandraj esperantistoj, post estrarkunsido de F.E.L. dum la antaŭtagmezo.
El la estrarkunsido ni retenas i.a. ke F.E.L. en la daŭro de 1981 organizos studotagojn, cele al formado de kadromembroj, por :

- propagandistoj/publikaj rilatoj
- grupgvidantoj
- kursgvidantoj

kun jena instruprogramo :

- komuna por ĉiuj : - perfektiga kurso de Esperanto
  historio
  literaturo
- aparta : por propagandistoj : komunikado
  publikaj rilatoj k.s.
  por grupgvidantoj : organizado
  parolteknikoj
  por grupgvudantoj : metodiko
  didaktiko.

En tiu kadro okazos en Antverpeno, je 29 11 80 unua studotago por kasistoj kaj grupgvidantoj. (vd sube)

La estraro ankaŭ difinis la taskojn de la estraroj. Jen ili :

| | |
|---|---|
| - Financoj | : J. VERSTRAETEN (kasisto), R. DE SCHEPPER (planado) |
| | G. MAERTENS (konsilanto), E-o Centro (librotenado) |
| - Administrado | : J. BOVENDEERD (sekretario), E-o Centro (korespondo) |
| - Kontaktoj kun la grupoj | : G. SCHROEYERS |
| - Kunordigado | : (komisiito) I. DURWAEL |
| - Kulturo | : F. ROOSE |
| - Membrovarbado | : vakas |
| - Planado kaj agado | : E. SYMOENS |
| - Informado | : R. DE SCHEPPER |
| - Turismo | : vakas |
| - Edukado | : J. BOVENDEERD (organizado de kursoj). |

Vakas do du estraraj postenoj. Kiu pretas ? Por kiam la virina elemento en nia estraro ?

Venonte ankaŭ eblos disponi pri inform- kaj ekspozicimaterialo ĉe Esperanto-Centro, Arsenaalstrato 5, 2000 ANTVERPENO, tamen laŭ strikta regularo, kies teksto estos havebla en la Centro. Ĝi cetere estos dissendita de la sekretario.

---------

La ĝenerala kunsido tre bone sukcesis. Ĉeestis multe da Okcident-Flandraj esperantistoj, kiuj ĉiu-laŭ-vice povis esprimi siajn kritikojn, dezirojn kaj sugestojn.

Fine konsentiĝis agadi provincnivele, kaj tiucele ili indikis kiel (unua) kontaktpersonon, S-ro Fern ROOSE, St. Klaradreef 59, 8000 BRUGGE 050/33 19 81.

Anonciĝis ankaŭ la starigo de Bruĝa Junulara grupo.

Unu el la "ve-krioj" de la Okcidentflandraj membrinoj estis, ke en la estraro mankas virinoj !

Post klarigo, ke okaze de la ĝenerala kunsidoj, neniu respondis la alvokon pri kandidatoj por la estraro, aŭdiĝis denove la invito partopreni en la estraro, speciale virina partopreno kaj ... ĉiu (denove) silentis !!! (escepte tamen de unu, kiu promesis eniri la estraron post du jaroj).

Kion konkludi de tio ? Ke la virinoj kritikas por la plezuro kritiki ? ?

Por forigi ĉiun eblan dubon tiurilate, F.E.L.-estraro denove kaj insiste alvokas personojn (virinajn !) por eniri la estraron.



Studotago (seminario)

Je sabato 29-a de novembro okazis en Antverpeno, kiel unua paŝo en la direkto de la de F.E.L. planitaj kadrokursoj, seminario por kasistoj kaj grupgvidantoj.

La unua parto, kiu koncernis kasistojn, estis ege bone partoprenata.

La celo estis egaligi la administradon, klarigi la kotiztabelojn de F.E.L. kaj U.E.A., priparoli la diversajn taskojn de kasisto.

Kiel ĉefaj taskoj de kasisto notiĝis :

- enkasigi kaj transpagi la kotizojn
- bremsi la elspezojn
- prepari buĝeton, kune kun la estaro, sur baze de ties agadplano
- zorgi ke la buĝeto estu kiel eble plej bone respektata
- fari financplanon, kune kun la estaro
- prizorgi la kontaktojn kun F.E.L.

La dua parto, por grupgvidantoj, eble estis malpli multnombre, sed ege intense partiprenata.

Unue, kiel ĉefaj taskoj de grupgvidanto notiĝis :

- koni la membrojn kaj gvidi ilin, konsederante ĉies karakteron kaj kapablojn.
- krei etoson de amikeco
- prepari programojn en kiuj ne povas malesti plibonigon de la lingvokono, praktikado de la lingvo, informado pri la movado kaj pri eblecoj de E-o.
- limigi membroperdon
- altiri novajn fortojn
- direkti la aktivecon al la membroj
- renovigi
- akceli internaciecon.

Due, la kunveno celis al kunven-gvidad-teknikoj.

Jen kelkaj ĝeneralaj gvidlinioj rilate al alparolado de la publiko :

- evti "kulisotimon" (plankenkoorts) per facila sinteno
- ne atenci la atenton, eks. per tro da movoj
- ne pasadi tien kaj reen
- resti bone videbla

Poste ĉiu ĉeestanto ricevis temon pri kiu li/ŝi parolu "publike" dum kelkaj minutoj, post kiam ĉiu laŭvice faris siajn rimarkojn.

La rezulto estis bonega. Jen la notitaj ĉefaj mankoj :

- (detala) informado
- entuziasmo
- uzado de mallongigoj sen eksplik̂o (tro facile kredi, ke la publiko jam estas inicita)
- flueco en la parolado
- spontaneco
- preparado
- prizorgita kadenco
- tro rapida parolo, sen paŭzetoj por permesi la publikon "digesti"
- denombrado (danĝera pro eventualaj forgesoj, eraroj ktp)
- kontakto kun la publiko
- uzado de ripetitaj ŝtopvortetoj (ekz. 'dinges')
- streĉado
- mem-instigo (nervoj)
- resti ĉe la temo
- konvinkopovo
- memkonvinko (neniam parolu pri io, pri kio oni mem ne estas konvinkita)
- vigleco

Ora regulo : diru ĉiam la veron, nur la veron, sed ne necese la tutan veron.

La tago finiĝis je ĉies kontenteco. Oni multe lernis. La etoso estis bonega.
Ni esperu, ke la seminario havos bonajn sekvojn.

---------

ANTVERPENO

Je vendredo 14-a de novembro okazis la unua prelego en la nova Vintra Ciklo organizita de LA VERDA STELO.
Unua preleganto estis S-ro Fernand ROOSE el Bruĝo pri "La Historio de la Pa[illegible]o"

---------

BRASSCHAAT

Je vendredo 7-a de novembro okazis, fare de la urbestro de Brasschaat, solena inaŭguro de la novaj oficejoj de la eldonejo "T.K./Stafeto".
Partoprenis la solenaĵon la prezidanto de U.E.A., la ĝenerala Direktoro de la Centra Oficejo; la Direktoro de la Grafika Centro; diversaj estraranoj de F.E.L. kaj multaj interesitoj.
La prezidanto de LA VERDA STELO profitis la okazon por anonci la temon de la Vintra Ciklo (Paco) kaj por transdoni al la urbestro ekzempleron de la foto-albumo "HIROŜIMA-NAGASAKI".
S-ro Kehlet ricevis, el la manoj de la prezidanto de U.E.A. valoran literaturan verkon (tradukon el la Flandra Literaturo).



BRUSELO

Je 04 11 1980, S-ro De Bruyne prezentis filmon pri Brazilo en la Brusela Esperantorondo. La filmon li ricevis de la Ambasado de Brazilo.
S-ro De Bruyne denove atentigas pri tio, ke eblas ricevi filmojn kaj ke li pretas veni al la grupoj por montri ilin.

MORTSEL

Je sabato 06 12 1980 okazis en Mortsel Zamenhofvespero. Temis pri amuza vespero al kiu partoprenis 27 membroj, el kiuj diversaj el LA VERDA STELO.

---------

Letero de la L.K.K. de la Universala Kongreso 1982

Karaj Samideanoj,
Estas kun granda ĝojo, ke ni povas anonci ka la Universala Esperanto-Asocio oficiale decidis okazigi la 67-an Universalan Kongreson en Antverpeno en 1982.

Antaŭaj Universalaj kongresoj en Belgio okazis :
- en 1911 en Antverpeno
- en 1928 en Antverpeno
- en 1960 en Bruselo.

Ekde nun, ni deziras havigi al vi kelkajn ĝeneralajn informojn pri tiu kongreso, ĉar ni nepre deziras ke ĈIUJ enlandaj esperantistoj kaj Esperanto-amikoj estu koncernataj kaj interesigataj pri tiu elstara evento en nia movado. Jen do kelkaj konkretaĵoj.

KONGRESLOKO : salonoj de la Antverpena Zoologia Ĝardeno (t.a. la "Koningin Elisabethzaal") apud la Centra Stacidomo.


DATO : de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1982

L.K.K. (Loka Kongresa Komitato) :

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : Fernand PIOT, senatano<br>Bondgenotenlaan 99, 3000 LEUVEN |
| Vicprezidanto | : Edward Symoens<br>Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT<br>031/66 62 66 |
| Sekretario | : Roger DE SCHEPPER<br>Doornstraat 22, 2610 WILRIJK<br>031/27 24 05 |
| Kasisto | : Erhard BOEHME<br>Plantinlaan 10, 2030 STABROEK<br>031/64 40 47 |
| Membro | : Wim DE SMET<br>Kertendreef 12, 2180 KALMTHOUT<br>031/66 99 49 |

Tio estas la unua laborkerno ; aliaj membro-kunlaborantoj aldoniĝos poste.
KONGRESA ADRESO : provizore ĉe la FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstrato 5, 2000 ANTVERPENO 031/16 05 05

Multaj esperantistoj, kiuj pro diversaj motivoj, ĝis nun neniam aŭ malofte partoprenis U.K., nun havos unikan okazon por enskribiĝi kaj dum unu semajno vivi en la tuspeciala internacia etoso, kiu karakterizas tiun kunvenon.
Krome, ekde nun, ĉiu izolita, ĉiu organizita esperantisto, ĉiu grupo povas kaj eĉ devas "uzi" tiun eventon en sia informado. U.K. ne estas la afero de kelkaj organizantaj homoj, sed ĝi estas la afero de ĉiuj esperantistoj, senescepte !
Se vi havas ideojn aŭ sugestojn rilate al la Kongresoj, (emblemo , kultura vespero ekskursoj ktp) ne hezitu komuniki ilin skribe aŭ telefone al unu el la LKK-anoj aŭ al la kontaktadreso !
Neniam pensu ke viaj ideoj ne taŭgas, ne valoras. Plej strangaj, plej nekutimaj ideoj ofte povas realiĝi, entute aŭ parte.
NE HEZITU, skribu aŭ telefonu !
Sincere via,
Nome de L.K.K., E. Symoens.



<u>Horizontale</u> : 1. tranĉa aĵ pika (R) - korelativo - parto de konstruaĵo.
2. reproduktí per metalaj literoj ŝmiritaj per inko - frandaĵo (R) 3. prefikso - diino (maten- aŭ vesperstelo) (R) - pers. pronomo. 4. pers. pronomo - metalo (R) 5. trinkilo - birdo (R). 6. ekkrio - membro (R) 7. persono (R) - enloĝanto el parto de Indonezio (R) - konjunkcio 8. manĝebla herbaĵo (R) - sezono (R) 9. infane - virino - instrumento.

<u>Vertikale</u> : 1. sovaĝa porko - ĉina ŝarĝportisto (R) 2. fari ion el nenio (R) - prilaborita bestfelo (R) 3. prefikso - produkto de la ŝafo (R) - prefikso. 4. eŭropa lando 5. korelativo de loko - ŝategi 6. pers. pron. - familiano (R) 7. numeralo - ludkarto 8. enloĝanto de nordamerika ŝtato 9. fari (R) - amfibio (R) pers. pron. 10. p_urigi (R) - subtera ĉambro (R) 11. birdo (R) - romana imperiestro kruela.

(R) = radiko.

-----

Vian solvon sendu al S-ro R. ISERENTANT, St. Pieterskerkstraat 61, 8000 Brugge.

----------

Al ĉiu niaj legantoj ni sincere kaj amike deziras

ĜOJAN KRISTNASKON kaj

FELIĈAN NOVJARON!

---